

Johann Esser,

## La marĉsoldatoj

*tradukita de Manfred Retzlaff*

1.) Kien ajn okuloj vidas,  
marĉo estas ĉirkaŭ ni.  
De nenie birdo ridas,  
Kverk' nur staras tie ĉi.  
Ni estas marĉsoldatoj  
kaj marŝas kun la ŝpatoj  
al marĉ'!

2.) Loĝas ni en ĉi soleco  
en barita koncentrej',  
for de ĝojo kaj gajeco  
en dezerta erikej'.  
Ni estas marĉsoldatoj  
kaj marŝas kun la ŝpatoj  
al marĉ'!

3.) En kolonoj mi marŝadas  
sub brulanta sun-radi',  
en la marĉo ni fosadas,  
sed hejmlanden volas ni.  
Ni estas marĉsoldatoj  
kaj marŝas kun la ŝpatoj  
al marĉ'!

...

4.) Hejmen, hejmen! Ni deziras  
esti ĉe la famili'.  
Pro doloro ni suspiras,  
ĉar kaptitaj estas ni.  
Ni estas marĉsoldatoj  
kaj marŝas kun la ŝpatoj  
al marĉ'!

5.) La postenoj ĉirkaŭiras,  
vin mortigos per pafil',  
se eskapi vi deziras  
tra kvarona la baril'.  
Ni estas marĉsoldatoj  
kaj marŝas kun la ŝpatoj  
al marĉ'!

6.) Ne lamentu ni, ĉar ĉiam  
jam ne daŭras tio ĉi.  
Kaj ni ĝoje diros iam:  
Hejme estas ree ni!  
Ekmarŝos kun la ŝpatoj  
ne plu la marĉsoldatoj  
al marĉ'!

*Traduko de la Germana poemo "Die Moorsoldaten" de JOHANN ESSER (\*1896-04-16 - †1971) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1984.*

*MR-149-1b / Arg-721-1451 (2012-12-11 17:32:53)*